

Dank'al sia abunda marvivo kaj siaj sablecaj plaĝoj, la Maldivoj estas ofte portretataj de vojaĝagentejoj kiel tropika paradizo. La ekonomio rondiras ĉirkaŭ turismo, kaj dekoj da insuloj estis evoluigitaj por la supra nivelo de la turisma merkato.

Ĝeneralaj datumoj

- Oficiala nomo: Respubliko de Maldivoj
- Loĝantaro: 306 000 (2007)
- Administracia ĉefurbo: Maleo
- Areo: 298 km²
- Ĉefaj religioj: Islamo
- Lingvoj: Diveha
- Vivespero: 68 jaroj (viroj), 69 jaroj (virinoj) (UN)
- Monunuo: Rufiyaa

Faktoj



Krom la insula ĉefurbo Maleo, eksterlandanoj rajtias nur loĝi en aliaj insuloj por nelongaj vizitoj, tiel limigante ilian efikon sur tradiciaj Islamaj komunumoj. Multaj Maldivianoj vivas malriĉe. Tamen, la lando evoluigis sian infrastrukturon kaj industriojn, inter kiuj estas la sektoro de fiŝkaptejoj, kaj akcelis plibonigon de sanzorgo, edukado kaj legokapablo. La ŝtato konsistas el 1190 insuloj, de kiuj 220 estas loĝataj de indiĝenoj kaj aliaj 87 utiligataj por turismaj celoj.

La Maldivoj estis trafitaj en decembro 2004 de la granda azia cunamo. Hejmoj kaj feriejoj estis ruinigitaj de la ondoj, kaj poste ekkomenciĝis grava rekonstruprogramo. Estas timo, ke kiam marnivelo forte altiĝos, insulaj landoj kiel la Maldivoj, kaj iuj pacifikaj teritorioj, simple estos inunditaj kaj malaperos.